regulo malnova, t. e. se ²/₃ el ¹/₃ de ĉiuj abonantoj de la «Esperantisto» (laŭ ilia nombro en Marto 1894) alsendos sian voĉon por la propono. Por la faciligo kaj justigo de la aferoj de la Ligo ni forte dezirus, ke tiu ĉi nia propono estu rajte akceptita, kaj tial ni insiste petas ĉiujn abonantojn de nia gazeto, ke ili forĵetu sian indiferentecon kaj alsendu al ni kiel eble plej frue sian voĉon por aŭ kontraŭ la propono, kiun ni faras nun al la Ligo en la parto de la anoncoj.

Pri reformoj en Esperanto.

Kiel mi promesis en n-ro 12 de «Esperantisto» 1893, mi nun komencas sisteman analizon de nia tuta lingvo. Peco post peco, komencante de la alfabeto kaj finante per la lasta vorto de la Meza Vortaro, mi priparolos la tutan lingvon, kaj pri ĉiu peco mi montros, kian formon mi donus al ĝi, se mi komencus la kreadon de la lingvo nun, havante post mi jam 6¹/₂ jarojn da praktika laborado kaj elprovado kaj elaŭdinte jam tiom multege da opinioj kaj konsiloj, ricevitaj de plej diversaj personoj, gazetoj kaj societoj el la plej diversaj landoj de la mondo. Kiam mia tuta analiza laboro estos finita kaj niaj legantoj havos antaŭ si jam plenan pentraĵon de la nove proponota perfektigita dialekto, tiam mi turnos min al la Ligo Esperantista kaj proponos al ĝi decidi per voĉdonado la sekvantajn demandojn: 1) ĉu ni devas restigi senŝanĝe la malnovan (ĝisnunan) formon de nia lingvo? 2) ĉu ni devas akcepti la novan formon, kiun mi estos prezentinta al la Liganoj en ĝia tuta pleneco? 3) ĉu ni devas fari aliajn reformojn en la lingvo? Se la Ligo elektos la unuan decidon, tiam ni tute ĉesos paroladi pri reformoj ĝis la tempo, kiam la Ligo iam eble decidos alie. Se la Ligo elektos la trian decidon, tiam ni daŭrigos presadi ankoraŭ aliajn reformajn proponojn de ni kaj de aliaj amikoj, ĝis la Ligo trovos, ke la demando de la reformoj estas elĉerpita (Kiu ne volas atendi kun siaj reformaj proponoj, ĝis mia analiza laboro estos finita, tiu havas kompreneble la rajton prezenti siajn reformajn proponojn al la Ligo jam nun). Se la Ligo elektos la duan decidon, tiam ni anoncos, ke la demando pri reformoj estas teorie finita kaj ni alpaŝos al la praktika elprovado. En la praktiko (t. e. en la eble ankoraŭ eldonotaj verkoj, en la korespondado inter la esperantistoj k. t. p.) tiam ĉiam ankoraŭ restos en sia plena forto la dialekto malnova; sed, komencante de tiu tempo, unu parto de nia gazeto (aŭ eble la tuta gazeto) estos jam presata en la dialekto nova, por doni al ĉiuj la eblon sufiĉe esplori, ĉu la nova dialekto ne havas en la praktiko iajn maloportunaĵojn aŭ erarojn. Se en la tempo de tiu elprovado montriĝos iaj eraroj, ili estos forigitaj. Tiu ĉi tempo de elprovado daŭros, laŭ la bezono, 3—6 aŭ pli multe da monatoj, kaj kiam neniaj duboj jam restos, tiam ni anoncos, ke la fina formo de la lingvo Esperanto estas jam decidita por ĉiam, kaj la lingvo restos de nun jam por ĉiam neŝanĝebla (en tiu senco, en kiu ĉiuj aliaj vivantaj lingvoj estas neŝanĝeblaj), kaj tiam komenciĝos la plena kaj solereganta praktika uzado de la nova dialekto. Sed antaŭ ol ni tion ĉi anoncos, ni kalkulos niajn fortojn, por konvinkiĝi, ĉu ni havas la eblon krei novan sisteman **literaturon anstataŭ la forĵetota malnova; se montriĝos, ke ni la sufiĉan forton ne havas, tiam ni atendos ankoraŭ kun la praktika enkonduko de la nova dialekto, ĝis la fortoj troviĝos.**

Niajn legantojn kaj entute la amikojn de nia ideo mi petas, ke, laŭ mezuro de presado de miaj artikoloj pri la reformoj en Esperanto, ili daŭrigu sendadi al mi siajn opiniojn kaj konsilojn. Ĉiujn ĝis nun ne esprimitajn kaj eble ankoraŭ venontajn bonajn konsilojn mi uzos en la fino (aŭ eble ankoraŭ en la daŭro) de mia serio da artikoloj en formo de aldonoj aŭ ŝanĝoj al mia proponata nova gramatiko-vortaro de nia lingvo.

I. Alfabeto.

En la ĝisnuna alfabeto de nia lingvo la praktiko montris la sekvantajn maloportunaĵojn: 1) Signoj superliteraj. Tiu ĉi punkto, kiu siatempe en la teorio ŝajnis tute sensignifa, en la praktiko montris sin kiel tre grava barilo por la disvastiĝado de nia lingvo. Dank' al tiuj ĉi signitaj literoj, kiujn la preseĵoj ne posedas, la libera ĉialoka presado de libroj en aŭ pri nia lingvo kaj la publikigado de nia lingvo per gazetoj fariĝis preskaŭ absolute ne ebla. Ni devas tiujn ĉi literojn forigi. 2) Superfluaj sonoj. Nia lingvo posedas kelkajn sonojn, kiuj ne trovas sin en tiu aŭ alia el la plej gravaj Eŭropaj lingvoj (ekzemple «ĵ», «ĝ» k. c.). Estas vero, ke tiuj ĉi sonoj altigas la bonsonecon de nia lingvo kaj ke ellerni ilin ne estas malfacile; sed ĉar nian lingvon ĉiu ellernas per libro kaj ne per buŝa instruado kaj, renkontante tuj sur la unua paŝo malfacilan kaj ne klare kompreneblan sonon, la plej granda parto da komencantoj perdas ĉian deziron lerni plu, tial ankaŭ tiuj ĉi sonoj estas granda barilo por la disvastiĝado de nia lingvo, kaj ni devas ilin forigi. Tiun ĉi oferon ni povas kompreneble fari nur al la plej gravaj de la ekzistantaj lingvoj; ĉar se ni volus fari tian oferon al ĉiuj lingvoj de la mondo, tiam el la tuta alfabeto restus nur kelko da literoj. Inter tiuj ĉi literoj ekzistas tamen tiaj, kiujn ni kuraĝe povas restigi; ekzemple la rusoj ne havas la sonon «h»; tamen la rusoj havas la sonon «ĥ», kiu en nia alfabeto de nun ne ekzistos kaj kiu estas tre simila al «h»; ni sekve povas simple diri al la ruso (sen ia timo de konfuzo de literoj), ke li elparolu la sonon «h» kiel sian «ĥ» — la ruso estos kontenta kaj la grava litero «h» estos savita. Al la italoj la «h» ne estas fremda, kvankam ili en sia lingvo ĝin ne elparolas *) Tiel same ekzemple la sono «c»: kelkaj lingvoj ĝin ne havas, sed ili havas la literojn kaj sonojn «t» kaj «s» — ni sekve povas simple diri al tiuj ĉi popoloj, ke ili elparolu nian «c» (kiun ni nun skribados «z») kiel sian «ts». 3) Kelkaj literoj elvokas ĉe la komencantaj lernantoj de nia lingvo konstantan konfuzon, dank' al la tre forte enradikita kutimo, kiun ili alportas el aliaj lingvoj; tiel ekzemple la germanoj kaj kelkaj aliaj nacioj tre ofte miksas la sonojn kaj literojn «s» kaj «z», ĉar ili kutimis elparoladi la «s» inter aŭ antaŭ vokaloj kiel «z». Pro tiu ĉi sama kaŭzo multaj eĉ pli malnovaj esperantistoj ofte forgesas kaj skribas ekzemple «mesuro» anstataŭ «mezuro», «naso» anstataŭ «nazo» k. t. p. Nia fonetika skribado de «z» anstataŭ «s» faras ofte malbonan impreson sur la komencanton, kiu kutimis uzadi certajn vortojn en ĉiuj lingvoj ĉiam kun «s». Forigi ĉiujn diritajn maloportunaĵojn ni povas nur per tio, ke ni tute forigos la sonon «z». Ni sekve skribados «naso»,

*) Mi havis kelkajn fojojn la intencon elĵeti ambaŭ literojn «ĥ» kaj «h»; sed per la ĝis nun faritaj provoj tio ĉi montriĝis iom neoportuna; mi tamen daŭrigos ankoraŭ la provojn en tiu ĉi direkto, kaj povas esti, ke mi siatempe proponos ankaŭ la elĵeton de la «h».

«mesuro» k. t. p. Neniu elparolados ilin «nazo», «mezuro», se li scios, ke «s» ĉiam havas egalan akran elparoladon kaj ke la sono «z» tute ne ekzistas; sed se kelkaj popoloj en la komenco eĉ elparolados «nazo», «mezuro», tio ĉi ankaŭ ne malhelpos, ĉar pro ne ekzistado de la litero kaj sono «z» tio ĉi donos nenian konfuzon aŭ malkomprenigon. 4) Se ni, pro la supre donitaj motivoj elĵetos kelkajn literojn el nia alfabeto, kelkaj sonoj fariĝos tute ne esprimeblaj per nia alfabeto; tio ĉi tamen tute ne malhelpos al ni: por la lingvo Esperanto tiuj ĉi literoj estos tute nebezonaj, ĉar la vortoj de nia lingvo neniam havos en si la respondajn sonojn; bezoni tiajn literojn ni povos nur tiam, kiam ni volos fonetike esprimi nomojn aŭ vortojn de aliaj lingvoj; sed por tiaj okazoj (kiujn antaŭvidi kaj antaŭzorgi ne povas eĉ la plej riĉa alfabeto) ni havos literojn provizajn, kiujn neniu esperantisto bezonos lerni, sed kiujn li serĉos en la plena gramatiko nur tiam, kiam li iam bezonos ilin uzi.

Apogante min sur ĉio supre dirita, mi proponas por la estonteco la sekvantan alfabeton:

Aa, Bb, Cc, Dd, Ee, Ff, Gg, (Hh?), Ji, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Tt, Uu, Vv, Zz.

Ĉiuj tiuj ĉi literoj estas elparolataj tiel same, kiel ĝis nun; nur la litero «c» estas elparolata kiel la ĝisnuna «ŝ», kaj «z» — kiel la ĝisnuna «c». La kaŭzo, kial mi proponas ŝanĝi en la montrita maniero la elparoladon de «c» kaj «z», estas: por eviti konfuzon kaj malbonsonecon, kiun donus la ĝisnuna elparolado de tiuj ĉi literoj dank' al la kutima neregula uzado de tiuj ĉi literoj en diversaj lingvoj. Pli klare la legantoj tion ĉi komprenos tiam, kiam ili vidos poste en la praktikaj provoj la manieron de uzado de tiuj ĉi literoj. — Al la legantoj, kiuj havas la kutimon tro rapide juĝi kaj kondamni ĉian objekton, ni turnas la atenton, ke la supre proponita alfabeto estas frukto de diversaj provoj kaj reprovoj kaj ke ĉio, kion mi nun diras, estas ankoraŭ ne faroj, sed nur proponoj; ili sekve ne rapidu kun kondamnoj kaj maldelikataj postuloj, ĝis la objekto iom post iom estos al ili klara per la postaj praktikaj provoj; sed ĉiujn konsilojn mi tre volonte kaj danke akceptos kaj mi petas la amikojn sendi al mi siajn opiniojn pri la proponita alfabeto.

En la sekvanta numero mi priparolos la tutan gramatikon.

L. Zamenhof.

El Varsovio ni ricevis la sekvantan leteron: «Varsovio, 1/XII 1893. Ni, malsupre subskribitaj, havas la honoron sciigi vin, ke hodiaŭ ni kunvenis en la nombro de 5 personoj, por priparoli la projekton de konstanta rondeto, kiu havus la celon proksimiĝi inter si la Varsoviajn esperantistojn kaj propagadi nian lingvon. Inter aliaj aferoj ni decidis komuniki al vi, ke pro via malesto en Varsovio kaj por pli granda oportuneco de niaj esperantistoj ni konsentis preni sur nin ĉiajn aferojn, tuŝantajn la Varsovian propagadon, se vi trovos tion ĉi dezirinda. Se vi akceptas nian proponon, volu sciigi la legantojn de la «Esperantisto» pri la esenco de tiu ĉi letero (Kompreneble, ke ni akceptis kun plezuro. La redakcio). Esperante, ke vi donos vian bonvolecon kaj favoron

ESPERANTISTO.

Monata gazeto de la lingvo internacia «Esperanto».

Kosto por jaro: 2,50 frankoj (= 2,00 markoj = 1,00 rublo = 2,00 kronoj). | Anoncoj po 10 centimoj por duonpaĝa milimetro.

Redaktoro: **L. Zamenhof,** Grodno (Rusujo).
Eldomanto-Administratoro: **W. H. Trompeter,** Schalke, Westfalen (Germanujo).

No. 2 (50). **Nurnbergo,** 15a Februaro 1894. **Jaro V.**

Pri reformoj en Esperanto.

(Daŭrigo.)

II. Gramatiko.

§ 1. La artikolon («la») mi proponas tute forigi. Kvankam per si mem ĝi estas tre oportuna, sed al kelkaj nacioj ĝi prezentas tuj en la komenco de la lernado tian malfacilaĵon, ke ili perdas la deziron okupi sin je nia lingvo. Ke lingvoj povas tute bone ekzisti sen artikolo, tion ĉi montras al ni la lingvoj slavaj, latina kaj aliaj. En la okazoj, kiam ni volas necese esprimi, ke ni parolas pri objekto difinita aŭ nedifinita, ni povas uzi anstataŭ la artikolo difinita — la vorton «tiu» (en la reformita formo, kiun ĝi havos) kaj anstataŭ la artikolo nedifinita la vorton «unu».

§ 2. En la substantivoj mi proponas la sekvantajn ŝanĝojn: a) Forigi la akuzativon, kiu de unu flanko prezentas grandan malfacilaĵon al multaj personoj kaj de la dua flanko kontraŭparolas al la komuna spirito de nia lingvo, kiu havas deklinacion nur per prepozicioj. Ke lingvo povas ekzisti tre bone sen akuzativo, tion ĉi ni vidas en diversaj civilizitaj lingvoj, kiuj havas akuzativon aŭ nur en certaj kategorioj da vortoj aŭ tute ĝin ne havas. Sekve: la akuzativo estu egala al la nominativo. Por eviti malkompreniĝon kaj konfuzon inter la nominativo kaj akuzativo, ni povas konsili (ne devigi) al la komencantoj, ke ili metu la nominativon ĉiam antaŭ la verbo kaj la akuzativon post la verbo; sed fari el tio ĉi ian regulon kaj malliberigi la ordon de la vortoj en la frazo ni tute ne bezonas, ĉar la logika sento kaj kelka kutimo facile donos al ĉiu la eblon eviti malkompreniĝojn. Eraroj en la uzado de la akuzativo apartenas al la plej oftaj, kiujn la komencantaj Esperantistoj (kaj ofte ankaŭ la Esperantistoj malnovaj) faras, kaj la forigo de la akuzativo prezentos grandan faciligon por la lingvo. b) La multenombron mi proponas formi per la finiĝo «i» (ĉar la litero «j» nun ne ekzistos en la alfabeto); tia finiĝo ekzistas en diversaj lingvoj (ekzemple latina, itala, slavaj), ne estas sekve arbitra (kiel kelkaj personoj erare pensis pri la «j») kaj ĝi estas multe pli konforma al la mola spirito de nia lingvo ol la «s», kiujn diversaj personoj proponis.

Ofte ripetata «s» donus jam per si mem tro akran sonadon al nia lingvo, tiom pli nun, kiam kun forigo de la sono «z» la nombro de la vortoj kun «s» pligrandiĝos; pro tiu ĉi sama kaŭzo mi proponas ankaŭ la forigon de la «s» en la formoj de la verbo, kiel oni vidos malsupre. Sekve anstataŭ «patroj» ni diros «patri», kaj la regulo estos: substantivoj en ununombro finiĝas per «o», en multenombro per «i».

§ 3. En la adjektivoj mi proponas la sekvantajn ŝanĝojn: a) Deklinacion ili ne havas, ĉar ĝi estas superflua balasto, kaj sufiĉas, se la deklinacio ekzistas ĉe la substantivoj. b) La adjektivoj kaj adverboj havas finiĝon egalan («e»), ĉar la diferencigado inter adjektivoj kaj adverboj estas por kelkaj popoloj tre malfacila. Sed ĉar la egaleco de adverboj kaj adjektivoj povus ofte doni malkompreniĝon (ekzemple: «patro bone kantas» povus signifi «bona patro kantas» kaj «patro kantas bone»), tial ni devas turni la atenton de la komencantoj, ke ili evitadu tiajn malkompreniĝojn per klara ligado de la vorto difinanta kun la vorto difinata kaj ne kun alia vorto (ekzemple: «bone patro kantas» = bona patro, «patro kantas bone» = bone kantas). Sekve ankaŭ tie ĉi, kiel ĉe la akuzativo, ni bezonas nur doni konsilon anstataŭ krei devigan regulon, kiu senbezone malliberigus la ordon de la vortoj en la frazo. c) Anstataŭ «pli» ĉe la gradoj de komparado ni uzos «plu» (ĉar la finiĝo «i» signifas substantivon multenombran) kaj anstataŭ «plej» ni uzos «maksu» (prenitan el «maxime»).

§ 4. En la nombrovortoj mi proponas la sekvantajn ŝanĝojn: a) anstataŭ «unu» ni uzos «un» (pli mallonge; «unu» ekzistis, por ke ni povu formi «unuj», sed kiam la multenombro havas «i», ni povas diri «un — uni») ; anstataŭ «naŭ» ni uzu «novu» (ĉar «ŭ» ne ekzistas). b) La nombroj ordaj, dank' al la ŝanĝo de la finiĝo adjektiva, havas ankaŭ la finiĝon «e». c) La sufikson «op» mi proponas forigi, kiel superfluan (anstataŭ «duope» ni povas diri «en du» aŭ simple «du»).

§ 5. Por la pronomoj, kiuj ĝis nun havis ne regule finiĝon de verbo, la plej logikaj kaj regulaj formoj estus la sekvantaj: «mo, to, lo, lino, so, mi, ti, li, lini, si»; sed praktikaj provoj montris al mi, ke tiuj ĉi formoj estus neoportunaj kaj estus malfacile alkutimiĝi ekzemple, ke «ti» signifas kelkajn personojn, ke «le» signifas «lia» k. t. p. Tial mi proponas: a) Pronomoj personaj: mu (= mi) («u» signifas nun nenian gramatikan finiĝon), tu (= vi, ci), lu (= li kaj ĝi), elu (= ŝi), su (= si), nu (= ni), vu (= vi), loru (= ili, por ambaŭ seksoj). b) La vortojn «ĝi» kaj «oni», kiel oni vidas el la supra tabelo, mi proponas tute forigi, ĉar ili al multaj personoj prezentas malfacilaĵon. Tiel same kiel en la substantivoj, laŭ la forte enradikita kutimo de ĉiuj popoloj (kvankam kontraŭ la logiko), ni diras, ke «ino» signifas speciale virinan sekson, kaj «o» signifas aŭ viron aŭ estaĵon senseksan, tiel ni ankaŭ en la pronomoj diros: «elu» signifas speciale virinan sekson, kaj en ĉiuj aliaj okazoj oni uzu «lu». Anstataŭ la vorto «oni» ni en okazo de bezono povas uzi, konforme al la senco, aŭ «homi» (= homoj) aŭ «iu» (en ĝia estonta reformita formo). c) La pronomoj posedaj laŭ reguloj de la adjektivo nun estos: «mue, tue, lue, elue, sue, nue, vue, lorue».

§ 6. En la verbo mi proponas la sekvantajn ŝanĝojn: a) Anstataŭ la formoj kun «s», kiuj estas tro akraj por nia lingvo (precipe post la anstataŭigo de «z» per «s» en multaj vortoj), mi proponas formojn kun «n» (pli regulaj estus formoj kun «t», responde al la 3a persono de verbo en multaj lingvoj; ni ne povas tamen akcepti la «t», ĉar ĝi

malbonigus la harmonion en nia lingvo). Mi proponas: por la infinitivo -«a» («i» estas okupita por substantivoj; «r», kiu estus pli internacia, prezentus malbonsonaĵon); formo ordona -«an» («u» devas resti libera por vortoj simplaj, kiuj ne povas havi ian gramatikan finiĝon kaj ne povas ankaŭ, pro bonsoneco, finiĝi per konsonanto); tempo estanta «en», tempo enstinta -«in», tempo estonta -«on», formo kondiĉa -«un». Sendube kelkaj legantoj faros la rimarkon, ke «an, en, in, on, un» jam ĉiuj estas okupitaj por vortoj aŭ sufiksoj; tamen tio ĉi nenion malhelpas, ĉar la okupiteco estas nur teoria kaj inter gramatikaj finiĝoj kaj memstaraj vortoj aŭ sufiksoj neniam povas naskiĝi ia konfuzo. En la vortaro ni diros, ke la finiĝo «in» (= -in) signifas tempon estintan de verbo, la sufikso «in» (= -in-) virinan sekson, la vorto «in» (= in) = la nuna «en». b) La ses participoj estas por si mem objekto tre logika kaj oportuna; sed nenia lingvo ilin havas, kaj al kelkaj popoloj, kiuj havas nur po unu participo aktiva kaj pasiva, la ses participoj prezentas eĉ tre grandan malklaraĵon kaj malfacilaĵon. Tial mi proponas: ni lasu nur po unu participo aktiva kaj pasiva (la provoj montris al mi, ke ni povas tion ĉi fari): participo aktiva havu la finiĝon «ente», part. pasiva -«ate». Sed por forigi la mankojn, kiuj naskiĝus de la forigo de la kvar ceteraj participoj, ni donos en la vortaro du novajn vortojn: pasate (= estinta) kaj future (= estonta).

§ 7. Adverboj apartaj ĉesas ekzisti (rigardu Adjektivon § 3.)

§ 8. Pri prepozicioj estos parolate en la vortaro, ĉar ili prezentas simplajn vortojn.

§§ 9 kaj 10 de la gramatiko restas senŝanĝe.

§ 11. Vortojn kunmetitajn mi proponas fari el plenaj vortoj, por eviti malbonsonecon kaj ofte ankaŭ nekomprenebleecon; ekzemple: vaporoŝipo (ne vaporŝipo); entute mi proponas uzi vortojn kunmetitajn kiel eble plimalofte, ĉar ili ne bone respondas al la romana karaktero de nia lingvo kaj ofte estas ne kompreneblaj por kelkaj popoloj.

§ 12 restas senŝanĝe.

§ 13. Por direkto mi proponas uzi la vorton «versu» (= en la direkto al . . .), ĉar la akuzativo ne ekzistas kaj ĝi ankaŭ prezentis maloportunaĵon; ekzemple: mi veturas versu Berlino, mi iras versu domo.

§ 14. La prepozicion «je» mi proponas tute forigi, ĉar la komencantoj tro multe uzas ĝin kaj per tio ĉi ne sole malbeligas la lingvon, sed ankaŭ suferigas la klarecon; la pli kompetentaj esperantistoj en la lasta tempo ne senprave evitadis tiun ĉi vorton. Ĉiu povas facile ĝin anstataŭigi per aliaj pli difinitaj prepozicioj, kaj ne estos ankaŭ malfeliĉo, se unu diros ekzemple «ĝoji pro tio» kaj alia diros «goji pri tio.»

§ 15 senŝanĝe.

§ 16 senŝanĝe (forlasinte, kompreneble, la rimarkon pri la nun ne ekzistanta artikolo «la»); sed mi konsilus uzadi la apostrofadon nur en versoj.

III. Tabelo de pronomoj.

La tabelo de interrilataj pronomoj kaj adverboj estis siatempe konstruita, por matematike faciligi ilian ellernadon. Ĉe la kreado de tia interrilata tabelo, kiu ekzistas en nenia lingvo, mi kompreneble devis elpensi la vortojn, kaj tio ĉi donis al diversaj amikoj kaŭzon al senfinaj kritikoj kaj disputoj. Por forigi tiun ĉi objekton de konstanta disputado, mi proponas detrui la reciprokan aranĝon de la tabelo kaj

rigardi la membrojn de la tabelo, kiel simplajn vortojn sen reciproka interrilato. Ĉar la nombro de la nomitaj vortoj ne estas tre granda, tial ni povas tion ĉi kuraĝe fari, tiom pli, ke la negranda perdo de facileco estos rekompencita per pligrandiĝo de natureco. Sekve mi proponas ekzemple: «omnu, kom, sik, semper» k. t. p. anstataŭ «ĉiu, kiel, tiel, ĉiam» k. t. p. Tial mi ne bezonas nun paroli pri tiuj ci vortoj kaj mi donos ilin simple en la vortaro, kiel simplajn vortojn.

IV. Sufiksoj kaj prefiksoj.

Ĉar ankaŭ ili havas nenion komunan kun la konstruo de la lingvo, sed prezentas apartajn vortojn, kiuj povas esti uzataj aŭ aparte aŭ en kunligo kun la radikoj de aliaj vortoj, tial mi ankaŭ pri ili parolos simple en la vortaro.

V. Vortaro.

Nun mi transiras al la plej granda parto de mia analizo — al la vortaro. En tiu ĉi vasta parto la plej multe estas al mi necesa la helpo de la amikoj, kaj tial mi petas ĉiun, kiu deziras partopreni en la reformado de la vortaro, ke li volu fari la jenon: Li prenu la Mezan vortaron (verko N-ro 21 aŭ 64), elskribu laŭ alfabeta ordo la vortojn Esperantajn kaj apud ĉiu vorto li skribu la novan formon, kiun li konsilus doni al tiu ĉi vorto, aŭ la signon «—», se li konsilas lasi la vorton sen ŝanĝo. La tiamaniere skribitan vortaron li volu sendi al mi (parto post parto), por ke mi povu, publikigante mian reformitan vortaron, komparadi ĝin kun la vortaroj alsenditaj kaj elprenadi el tiuj ĉi lastaj ĉion bonan, kion mi trovos en ili kaj por ke mi en okazo de dubo povu vidi, kia formo por tiu aŭ alia vorto estas la plej multe aprobata. En n-ro 4 de nia gazeto mi analizos la vortaron de A ĝis H, en n-ro 5 — de H ĝis O, en n-ro 6 de O ĝis la fino. En n-ro 3 mi faros paŭzon, por ke la amikoj havu tempon pripensi, ellabori kaj alsendi al mi la unuan parton de la vortaro, antaŭ ol mi komencos la analizadon.

Tie ĉi mi diros kelkajn vortojn pri la principoj, kiujn mi laŭ mia persona sperto kaj laŭ la plimulto da ricevitaj opinioj rekomendus al la amikoj en la nuna verkado de la vortaro: 1) La vortoj devas esti kiom eble pli internaciaj, konataj al la mondo. 2) Ili tamen ne devas esti malbonsonaj, sed ili estu harmonie konformaj al la komuna spirito de nia lingvo. 3) Por ke la karaktero de la tuta lingvo estu pli unuforma kaj ne simila al ia neharmonia miksaĵo, mi proponus (dank' al la romana fundamento de nia lingvo) evitadi vortojn germanajn aŭ slavajn kaj preni, kiom ĝi estos ebla, nur el lingvoj romanaj (latina [la plej bone], itala, hispana k. t. p.). 4) Peni, ke la skribado de la vorto estu kiom eble plej proksima al ĝia skribado en aliaj lingvoj, kvankam ĝia elparolado eble estos iom alia (Ekzemple: ni uzos «centro» (legu «ŝentro») kaj ne «zentro», «stono» (se ni lasus tiun ĉi vorton) kaj ne «ctono» (kiel ŝajne postulas nia nova alfabeto). Kompreneble ne ĉiam ni devas tion ĉi fari; ekzemple: anstataŭ «quale» ni devas skribi «kvale», anstataŭ «natio», kiu estus malagrabla kaj kontraŭkutima al ĉiuj popoloj, ni uzos laŭ itala maniero «nazio» aŭ «naziono», anstataŭ «caractero» — «karaktero», ĉar la elparolado «ŝaraŝtero» estus por ĉiuj nacioj tro fremda. 5) Kiom ni povas, ni devas peni, ke la vortoj simplaj ne donu ian konfuzon kun vortoj kunmetitaj (kiel ekzemple la ĝisnuna vorto

«defendi» povus signifi «de-fendi»); sed ĉar tro pena evitado de tiaj aperoj estas neebla (alie ni devus multajn vortojn tute arbitre elpensi), tial mi pensas, ke en okazoj, kie ni ne bezonas timi malkompreniĝon, ni povas tiajn vortojn lasi; ekzemple anstataŭ «mateno» ni povas kuraĝe lasi la originalan vorton «matino» k. t. p., ne timante ke iu akceptos ĝin por virina sekso de la vorto «mato».

Mi esprimis la principojn, kiuj estus rekomendindaj laŭ mia nuna persona opinio; sed se tiu aŭ alia amiko aprobas aliajn principojn, tiam mi petas lin, ke li en la verkado de la vortaro libere sekvu sian opinion; ĉar nur tiam la alsendotaj vortaroj prezentos al mi helpon, se ili prezentos la memstarajn opiniojn de diversaj personoj (supozante, kompreneble, ke la amiko sendos al mi sian laboron kiel konsilon kaj ne kiel paraliziganta postulon).

Al la personoj, kiuj sendos al mi supramaniere verkitajn vortarojn, mi estos tre danka. Se en mia supre proponita gramatiko iu trovos erarojn aŭ maloportunaĵojn, mi petas lin, montri ilin al mi.

Por ekzemplo de la nova dialekto mi donas tie ĉi la preĝon «Patro nia» en la nova dialekto; en tiu ĉi peco la gramatiko estas jam reformita, kvankam la vortoj estas ankoraŭ provizoraj kaj eble ankoraŭ estos ŝanĝitaj ĉe la analizado de la vortaro:

«*Patro nue, kvu esten in cielo, sankte estan tue nomo, venan regito tue, estan volo tue, kom in cielo, sik anku sur tero. Pano nue omnedie donan al nu hodiu e pardonan al nu debi nue, kom nu anku pardonen al nue debenti; ne kondukan nu in tento, sed liberigan nu de malbono.*»

L. Zamenhof.

Signoj de poŝto.

Uzitaj signoj de poŝto estas ordinare forĵetataj sen ia uzo kaj utilo; tamen tiuj ĉi bagatelaj objektoj en pli granda nombro prezentas certan kapitalon, kion ni povus uzi por la celoj de nia afero. Ni petas tial niajn legantojn, kiom ili havos la eblon, kolektadi uzitajn signojn de poŝto kaj sendadi ilin al la administracio de nia gazeto (s-ro W. H. Trompeter), kiu vendados ilin kaj uzados la tiel akiritan sumon por celoj de nia afero. Precipan indon havas la signoj de poŝto pli maloftaj aŭ de pli malnovaj jaroj. Oni volu kolektadi kaj sendadi ankaŭ kovertojn (ne disŝiritajn) kun enpresitaj signoj de poŝto kaj poŝtajn kartojn. Ni petas ankaŭ la legantojn, se tio ĉi ne estos al ili maloportuna, uzadi por siaj leteroj al la redakcio kaj administracio kovertojn kun enpresitaj signoj de poŝto; tiuj ĉi lastaj havas en la vendado pli grandan prezon ol la simplaj signoj de poŝto. Markoj (signoj de poŝto) pli maloftaj ofte prezentas sufiĉe grandan indon; tiel ekzemple por rusa marko de la jaro 1857 (10 kop.; bruna, mezo blua, rando ne dentita) la administracio povus ricevi 1½ frankojn por peco; por marko 3½-rubla de la jaro 1883 — 6 frankojn; por marko 7-rubla de 1883 — 10 fr.; por 10-kopeka marko pola de 1860/65 — 1 fr.; por koverto kun enpresita marko 5-kopeka de 1845/46 — 8½—12 fr. Sed ankaŭ la plej ordinaraj nuntempaj markoj, kovertoj, poŝtaj kartoj kaj banderoloj en pli granda amaso povas doni ne tre bagatelan enspezon. Por eviti duoblan transsendon kaj superfluajn klopodojn kaj laborojn, la kolektantoj volu sendadi

622. Wachter, Epernay [L. de Beaufront].
623. Vasseur, » [L. de Beaufront].
624. Gervais, » [L. de Beaufront].
625. Lemaire, » [L. de Beaufront].
626. d'Eyssautier, Paris.
627. Lagenest, St. Germain.
628. Laignier, Reims.
629. Kergorlay, Montpellier [Lemaire].
630. Gofflot, Mantes.
631. Cardozo, Lisabon.
632—33. Dr. Diodono, Sofia.
634. Kürschner, Zürich.
635. Dulaŭ & Cie., London.
636. Almeida, Rezende.
637. Abrutin, Haskovo [Feldŝar].
638. Casal, Corùna.
639. Popov, Tirnovo.
640. Geoghegan, East-Sound.
641. Edwards, New-Whatcom.
642. Sklar, Nikolajev [Feldŝar].
643. Benderski, Nikolajev [Feldŝar].
644. S. I. Vogau, Rovnoje.
645—48. L. Zamenhof, Grodno.
649. Markmann, Nikolajev [Feldŝar].
650. Vilsker, Novo-odessa [Feldŝar].
651. F. Langlet, Upsala [V. Langlet].
652—54. Dr. Diodono, Sofia.
655. de Carvalho, Linha do Douro-Ermida [Almeida].
656. da Cruz Cappello, Rezende [Almeida].
657. de Magalhaes, Rezende [Almeida].
658. Ferreira, Lisabon.
659. Boalt, Upsala [V. Langlet].
660. Thörn, Böda.
661. Godenius, Böda [Thörn].
662. Tidestrand, Arboga.
663. Husson, Soissons [L. de Beaufront].
664. Runstedt, Moholm.

Al la demando pri la reformoj.

Kiel mi jam diris en la pasinta numero de nia gazeto, mi faras en la nuna numero paŭzon kun mia artikolo «Pri reformoj en Esperanto», por doni al la legantoj la eblon prepariĝi al kunlaborado por la vortaro. En la sekvanta numero mi rekomencos la presadon de la artikolo, kaj dume mi uzos la okazon de la paŭzo, por diri kelkajn vortojn pri la maniero, en kiu mi uzis por mia projekto la diversajn proponojn kaj opiniojn, kiujn mi ricevis aŭ legis en la daŭro de 6 jaroj.

Multaj amikoj, ne trovante en mia projekto postesignojn de iliaj proponoj, diros kredeble, ke mia projekto estas ne plena kaj ke mi forgesis enpreni en la projekton multon el la bonoj, kiujn oni proponis al mi. Tial mi antaŭ ĉio rimarkas, ke mi **ĉiujn** ricevitajn proponojn kaj opiniojn ne sole tralegis, sed ankaŭ bone pripensis kaj en okazo de bezono elprovis. Sed la plej grandan parton mi ne enprenis simple el la kaŭzo, ke mi trovis en ili ne plibonigon, sed malplibonigon de nia lingvo aŭ malutilon por la progresado de nia afero. Se la aŭtoro de tiu aŭ alia propono pensas, ke mi eraris, li povas nun en sia propra nomo publikigi sian proponon. Priparoli kritike ĉiujn tiujn ĉi proponojn mi ne povis, ĉar tio ĉi estus laboro senfina kaj tute ne interesa por la legantoj de nia gazeto. El ĉiuj ricevitaj proponoj nur kompare tre malgranda parto montriĝis kiel bona (almenaŭ en miaj okuloj); sed ankaŭ el tiu ĉi lasta kategorio da proponoj mi post longaj pripensoj povis akcepti nur **parton**, — la reston mi devis forlasi sen uzo, ĉar, kvankam per si mem mi ilin aprobis, mi tamen vidis, ke en la **nunaj cirkonstancoj** ilia akceptado ne estus utila.

Analizi ĉiujn faritajn proponojn estus, kiel mi diris, laboro superflua kaj senfina; tamen **kelkajn** el ili mi tie ĉi analizos, pro ekzemplo, por montri al la legantoj, ke, se mi ian proponon ne akceptis, tio ĉi ne montras, ke mi ĝin ne pripensis. Mi analizos kompreneble nur tiajn proponojn, kiujn mi per si mem **aprobas**, kvankam akcepti ilin mi ne povis.

Ekzemplo 1. Oni proponis, ke la substantivoj de virina sekso havu la finiĝon «a» anstataŭ la sufikso «in(o)» (ekzemple: «patra» an-

stataŭ «patrino»; la adjektivo devus tiam kompreneble anstataŭiĝi sian «a» per alia litero). La virina «a» ekzistas en kelkaj lingvoj kaj estus efektive pli oportuna ol «ino», dank' al sia pli granda natureco kaj mallongeco. Sed, ricevinte tiun ĉi proponon, mi rememoris, ke la «a» por virina sekso venis al mi en la kapon ankoraŭ en la komenco de mia kreado de la lingvo kaj ke mi tiam pro kelkaj praktikaj kaŭzoj ĝin forĵetis. Malgraŭ tio mi en la lasta tempo denove kliniĝis al la flanko de tiu ĉi «a» kaj jam decidis akcepti ĝin en mian projekton. Tio ĉi tamen en la praktiko ne estis tiel facila, kiel ĝi sendube montriĝas al ĉiu en la teorio: la ŝajne tiel simpla «a» montriĝis nekonforma al la konstruo de nia lingvo; kiel finiĝo la «a» virina ne povis esti uzata, ĉar tiam ĝi perdiĝadus en la vortfarado kaj ni ne scius ekzemple ĉu «frate» estas la adjektivo de «frato» aŭ de «frata» (fratino), ĉu «viriĝi» signifas «fariĝi viro» aŭ «fariĝi vira» (virino) k. t. p. Mi devis sekve aŭ ŝanĝi la konstruajn principojn de nia lingvo, aŭ diri, ke «a» estas ne defalebla finiĝo sed nedefalebla sufikso, kiu diferencas de la aliaj sufiksoj per tio, ke ĝi ne akceptas post si la substantivan finiĝon «o» (ekzemple: «fratae, viraiĝi» k. t. p.) El la du alternativoj mi elektis la lastan, kiel malpli riskan. La «a» virina sekve jam enportis en la lingvon ion fremdan, escepton el la reguloj; mi tamen decide ĝin akceptis en la projekton, pensante, ke la lernantoj ne trovos en ĝi ian malfacilaĵon. Sed ju pli mi daŭrigadis la praktikajn provojn, des pli mi konvinkiĝadis, ke la «a» virina prezentas ĉiam ian dissonancon en nia lingvo, kaj tiel mi en la fino decidis ne akcepti ĝin, sed resti ĉe la malnova «ino», kiu estas jam elprovita kaj bona. La legantoj sekve vidas, ke, kvankam mi pri la «a» virina ne parolis en mia projekto eĉ unu vorton, tio ĉi tamen tute ne montras, ke mi ĝin ne pripensis aŭ ne elprovis. (Se iu el la amikoj trovos ian rimedon por oportuna enkonduko de la «a» virina, tiam mi eble reakceptos ĝin ankoraŭ en la fino de mia analiza laboro.)

Ekzemplo 2. Kelkaj amikoj proponis, ke ni enkonduku apartan sufikson por substantivoj speciale viraj tiel same, kiel ni havas sufikson por substantivoj speciale virinaj (Precipe konvinke tion ĉi proponis s-ro Lojko en lia lasta vizito ĉe mi en Grodno). Pripensinte tiun ĉi proponon, mi trovis, ke ĝi estas ne sole tre logika, sed ankaŭ tre oportuna. «Fratiro» ekzemple signifus tiam speciale fraton kaj «fratino» — speciale fratinon, dum «frato» signifus simple infanon de tiuj samaj gepatroj (= aŭ frato, aŭ fratino); «frati» signifus sekve «gefratoj» kaj la prefikso «ge» povus esti forĵetita. Parolante ekzemple pri bovoj, ni povus ĉiam klare esprimi, ĉu ni parolas pri bovoj sen diferenco de la sekso aŭ pri bovinoj aŭ pri bovo-viroj (ne bezonante uzadi la aldonatan vorton «viro»). Kelkajn tagojn post la forveturo de s-ro Lojko mi jam decidis akcepti la viran sufikson en mian projekton. Sed post plua pripensado de tenis min de tiu ĉi paŝo la sekvanta konsiderado: nia lingvo devas 'antaŭ ĉio esti plej facila por ĉiuj nacioj kaj, kiom ĝi nur estas ebla enhavi en si nenion, kio estus kontraŭ la kutimo de la nacioj kaj prezentus por ili malfacilaĵon aŭ fremdaĵon; vira sufikso prezentus, almenaŭ en la komenco (plej grava tempo!) kelkan maloportunaĵon kaj fonton de eraroj; malesto de vira sufikso, kiel montris la ĝisnuna praktiko, ne prezentas maloportunaĵon; sekve rezultato: en nia pure praktika afero la neoportuna teoria logiko devas cedi al la pli oportuna praktika kutimo de la popoloj — kaj la vira sufikso ne devas ekzisti.

Ekzemplo 3. Serĉante erarojn en nia lingvo, unu volapükisto

antaŭ 4—5 jaroj rimarkis en sia kritiko, ke, dank' al la neakcentitaj finiĝoj de la verbo, nia lingvo en la elparolado ne permesas al la orelo klare diferencigi la tempojn (fáras, fáris, fáros, fárus). Per si mem la rimarko estas erara (kiel sendube konvinkiĝis ĉiuj parolantoj la lingvon Esperanto); tamen, por eviti tian ŝajnan neoportunecon, mi volis proponi en mia projekto la sekvantan ŝanĝon: la verbaj formoj finiĝu per akcentitaj vokaloj (á, é, í, ó, ú). En la vortaro ni tiam dirus: «o» signifas substantivon, — «ó» signifas tempon estontan de verbo. Maloportunaĵon tiu ĉi ŝanĝo ne prezentus, ĉar akcentitaj vokaloj ekzistas en ĉiuj presejoj de la mondo (tiom pli, ke estus ja tute egale, ĉu la presejo uzus ´ aŭ ` aŭ ^ k. t. p); dume oportunaĵojn la dirita ŝanĝo prezentus grandajn: 1) la formoj de la verbo estus tre klare diferencigeblaj eĉ por orelo tute ne alkutimita; 2) la formoj de la verbo, renkontataj en la parolado sur ĉiu paŝo, perdus la finiĝon konsonantan kaj tiel preskaŭ ĉiuj vortoj en nia lingvo havus finiĝon per vokalo, kio altigus la bonsonecon de la lingvo; 3) ricevinte certan nombron da vortoj kun akcento en la fino, la lingvo, sen malfaciliĝo de la lernado, ricevus kelkan diversecon en la akcentado, kiu levus ankoraŭ ĝian bonsonecon; 4) por la versofarantoj la granda nombro da vortoj kun akcentita finiĝo estus tre agrabla gajno. — Dank' al la 4 diritaj oportunaĵoj, kiuj povus esti akiritaj per unu tre simpla reguleto, la akcentitaj formoj havis por mi jam de longa tempo grandan allogon kaj mi decidis akcepti ilin en la projekton. Sed, pripensinte la aferon pli objektive, mi devis konfesi, ke la akcentoj sur literoj por multaj personoj prezentos ion fremdan en nia lingvo, objekton de disputado kaj nekontenteco; al la komencantoj (tiuj ĉi personoj estas por ni la plej gravaj) la akcentoj per la unua rigardo prezentos ion komplikitan, la lingvo tiam ŝajnos al ili ne tiel simpla, kiel ni dezirus. . . Mi akceptis la formojn, elĵetis ilin, denove akceptis, provis anstataŭigi ilin per aliaj formoj, kiuj en la esenco donus tion saman, ne fortimigante tamen la unuan rigardon (ekzemple «h» post vokalo devus signifi, ke la vokalo estas akcentita . . . . k. t. p.), kaj post multaj provoj kaj reprovoj mi fine devis forĵeti la akcentitajn formojn, kvankam mi persone forte ilin aprobas.

Ekzemplo 4. Por pliriĉigi la lingvon, kelkaj amikoj proponis diversajn novajn sufiksojn kaj prefiksojn, el kiuj kelkaj estis laŭ mia opinio tre bonaj; mi tamen ne povis ilin akcepti, ĉar mi gvidis min per la sekvanta principo: lingvo, kies unua kaj plej grava celo estas fariĝi tutmonda, devas antaŭ ĉio esti la plej simpla kaj plej facila por ĉiuj; tial ĉiujn novajn regulojn, sen kiuj la lingvo povas tre bone ekzisti kaj kies akcepto iom plimalfaciligus la lernadon de la lingvo, ni ne devas akcepti, kvankam ili per si mem eĉ estus tre belaj.

Ĉu miaj klarigoj pri la montritaj proponoj konvinkis la legantojn pri ilia neakceptindeco — mi ne scias, ĉar tiel same, kiel mi ilin teorie aprobis kaj post provoj kaj reprovoj malakceptis, tiel same ankaŭ la legantoj povus juĝi pri ili nur post multaj provoj. Al tio ĉi oni ne forgesu, ke el la grandega amaso da proponoj mi elektis por ekzemplo nur la plej bonajn, pri kiuj mi mem ankoraŭ ne estas certa, ĉu en la fino de mia analiza laboro, post pluaj provoj, mi ilin ne reakceptos. Mi ne parolis pri ili por batali kontraŭ ili — mia celo estis nur: montri per kelkaj ekzemploj, ke se tiun aŭ alian eĉ bonan proponon mi ne akceptis en mian projekton, tio ĉi tute ne montras, ke mi la proponojn ne pripensis kaj ne elprovis.

Al kelkaj novaj legantoj, kiuj ne konas la historion de naskiĝo de nia Ligo, eble ŝajnos stranga, ke ni presas iafoje proponojn pri reformoj en la parto de anoncoj anstataŭ en la teksto de nia gazeto. Ni ripetos tial mallonge la kaŭzon de tiu ĉi apero. Artikoloj pri reformoj (pro kaj kontraŭ) kaj kun diversaj reformaj proponoj venas al ni en tia granda amaso, ke ni en nia malgranda gazeto ne povas presi eĉ centan parton de ili. La redaktoro de nia gazeto tial estis devigita elekti el ĉiuj proponoj tion, kio ŝajnas al li la plej bona, kaj prezenti tion ĉi en formo de sistema projekto de reformoj; ĉio cetera devis resti neakceptita; se iu el la aŭtoroj de neakceptitaj proponoj volas prezenti sian opinion al la Esperantistoj, li havas plenan rajton tion ĉi fari, sed tiam li devas mem presi sian artikolon per siaj propraj rimedoj kaj dissendi ĝin al la Liganoj. Ĉu li faros tion ĉi per aparta presado kaj dissendado aŭ per pagataj anoncoj en nia gazeto, por kiuj la redakcio ne havas respondecon — tio ĉi jam dependas de la volo de la proponanto.

Mia nuna artikolo estis jam finita, kiam mi ricevis de s-ro kapitano Forkarth el Josefstadt, Bohemujo, leteron, en kiu li proponas, ke mi post la fino de mia reforma projekto proponu al la Ligo ne tri, sed kvar demandojn; la kvara demando estus: ĉu la Esperantistoj deziras akcepti en principo mian projekton de reformoj, sed fari kelkajn ŝanĝojn en ĝiaj apartaj detaloj? En efektivo la propono de s-ro Forkarth jam sin trovas en la 3a de miaj proponotaj demandoj («ĉu ni devas fari aliajn reformojn en la lingvo?»); la vortoj «aliaj reformoj» ne signifas ja, ke la reformoj devas esti tute aliaj, de la komenco ĝis la fino: ili povas ankaŭ diferenci de miaj reformoj nur en kelkaj detaloj. Tamen povas esti, ke la personoj, kiuj dezirus akcepti mian tutan projekton, sed volus fari en ĝi nur ian malgrandan ŝanĝon, eble ĝenos sin voĉi por la 3a punkto; tial mi efektive intencas proponi siatempe ankoraŭ kvaran demandon, konsilitan de s-ro Forkarth. La personojn, kiuj voĉos por la kvara punkto, mi petos, ke ili samtempe kun alsendo de sia voĉo publikigu ankaŭ por voĉdonado de la Ligo la ŝanĝon, kiun ili proponas fari.

En la fino mi diros kelkajn vortojn ankoraŭ pri unu propono, kiun mi ricevis en la lastaj tagoj. S-ro instruisto Kürschner el Zürich, Svisujo, proponas, ke ni tute ne uzadu en nia lingvo grandajn literojn (ekzemple en la komenco de frazoj, en propraj nomoj k. t. p.). Tiu ĉi propono estas laŭ mia opinio tre prudenta, kaj mi ĝin aprobas el la tuta koro, ĉar efektive la uzado de du specoj de literoj estas tute superflua kaj sensenca. Sed ĉar tio estas demando ne sole de nia lingvo, sed entute de ĉiuj lingvoj, kaj kun la konstruo de nia lingvo ĝi havas nenion komunan, tial mi pensas, ke ni devas lasi tiun ĉi demandon por tempo estonta kaj nun ni devas eviti ĉian superfluan bataladon kontraŭ la kutimoj de la popoloj, por ne malfaciligi senbezone la bataladon por nia lingvo. Cetere, mi ne diras ankoraŭ mian lastan opinion pri tiu ĉi propono; povas esti, ke post plua pripenso mi akceptos ĝin ankoraŭ en mian projekton en la fino de mia laboro. **L. Zamenhof.**

Pri la «j».

El la opinioj, kiujn mi ricevis ĝis nun pri mia nova alfabeto, preskaŭ ĉiuj senescepte enhavas absolutan kaj plenan aprobon. Nur pri unu litero mi ricevis de diversaj flankoj demandojn, kiujn mi nun volas

respondi. Oni demandas min, kial mi elĵetis la literon «j» kaj kiel mi ĝin anstataŭiĝos en tiaj vortoj, kiel ekzemple «adjektivo, projekto, jam» k. t. p. La demando estas grava, tiom pli, ke la litero «j» estas punkto, pri kiu mi ankoraŭ mem dubas kaj pri kiu mi deziras konsiliĝi kun niaj amikoj. Tial mi rapidas respondi la demandon, antaŭ ol mi alpaŝas al la publikigado de la vortaro.

Unu el la ĉefaj principoj de mia reformita alfabeto estis: eviti literojn kaj sonojn, kiuj sen buŝa instruado prezentus malklaraĵon al ia el la plej gravaj popoloj aŭ postulus tro komplikitajn klarigojn en la lernolibroj difinitaj por tiu ĉi popolo. La «j» apartenas al tiaj literoj: al unu tre grava popolo (francoj) estas iom malfacile tute precize klarigi (sen buŝa instruado kaj sen komplikitaj ekzemploj) la elparoladon de tiu ĉi litero; ankaŭ al dua tre grava popolo (rusoj) la preciza klarigado de la «j» povas esti farata ne per simpla litero, sed nur per ekzemploj, ĉar la rusoj havas literojn por la grupoj «ja, je, ju, jo» sed ne havas apartan literon por la sono «j» antaŭ vokalo. Du cirkonstancoj tre gravaj, por ke ni la «j» elĵetu el la lingvo, kiu deziras fariĝi tutmonda sen subteno de potenculoj.*)

Kiel helpi al si sen la litero «j»? Tiel same, kiel sen la aliaj elĵetotaj literoj, t. e: aŭ elĵeti la literon (ekzemple: «sinoro, proekto, Mao» anstataŭ «sinjoro, projekto, Majo») aŭ anstataŭigi ĝin per la parenca litero (sekve ankaŭ sono!) «i» (ekzemple: «adiektivo, Ianuaro, Iulio» anstataŭ «adjektivo, Januaro, Julio») aŭ fine per aliigo de la vortoj (ekzemple: «maestro, maksu, si, anuo» anstataŭ «majstro, plej, jes, jaro»).

Tia estas mia nuna opinio, kiu igis min elĵeti la «j» el la alfabeto. Tamen se pluaj provoj, farotaj de mi kaj de aliaj amikoj, montros, ke la malutilo de la neekzistado de «j» estas pli granda ol la utilo de ĝia elĵetado, tiam mi reakceptos la literon en mian proponotan alfabeton en la fino de mia projekto. Pri la «j», tiel same kiel pri ĉiu alia punkto de mia projekto mi ne diras ankoraŭ mian lastan opinion, ĝis mi ricevos sufiĉan nombron da motivitaj opinioj de niaj amikoj. Por ke mi povu poste prezenti al voĉdonado de la Ligo projekton pli-malpli perfektan kaj per tio faciligi la voĉdonadon kaj la elekton de la fina formo de nia lingvo, mi petas ripete, ke la amikoj volu sendi al mi kiom eble pli motivite siajn opiniojn pri la diversaj punktoj de mia projekto antaŭ kaj ekster la oficiala voĉdonado, kiun mi petos siatempe.

L. Zamenhof.

Ni prepariĝu!!

Post 3 monatoj mia analiza laboro pri reformoj en Esperanto estos finita, kaj tiam, farinte en ĝi kelkajn modifikaciojn, kiuj eble ĝis tiu tempo montriĝos utilaj, mi proponos ĝin al la voĉdonado de la Esperantistoj. Se la plimulto ne decidos, ke ni devas lasi la lingvon netuŝite en ĝia ĝisnuna formo, tiam oni aŭ akceptos mian projekton, aŭ oni faros

---

*) Strange estas, ke la malfeliĉa «j» prezentas ofte malfacilaĵon eĉ al tiaj popoloj, kiuj havas en sia lingvo la literon kaj sonon «j» tute similan al la nia! Ekzemple la germanoj! Unu germana klubo esperantista demandis min antaŭ kelkaj jaroj, kiel oni devas elparoli la «j»; en unu germana lernolibro de nia lingvo estas dirite, ke «j» estas vokalo kaj «krajono» estas kvarsilaba; en alia ankaŭ lernolibro estas instruate, ke «krei = krej»!!

en ĝi diversajn ŝanĝojn; en ambaŭ okazoj ni baldaŭ trovos nin antaŭ la neceso krei novan sisteman literaturon anstataŭ la malnova, kaj al tio ĉi ni devas esti frutempe pretigitaj!!

Ĉe la malrapida alportado de helpo de la flanko de niaj amikoj, ni devas komenci la prepariĝadon tre frue, por ke ni ĝis la decida momento estu jam tute pretaj, ĉar alie ni tiam eble longe devos stari senmove: la malnova estos kondamnita, kaj la novan ni ne povos komenci. Por ke ni en la responda momento estu jam tute pretaj kaj ne devu halti (kio efikus tre senkuraĝige sur multajn amikojn de nia afero), mi jam nun komencas preparajn paŝojn por la ekkreado de sistema literaturo, kiam venos la tempo, kaj pro energia helpo en tiu ĉi prepariĝado mi nun alvokas ĉiujn amikojn de la lingvo Esperanto. Mi petas ilin forjeti sian dormadon, sian paralizigan «oni faros sen mi»; mi petas, ke ĉiu alportu sian briketon al nia konstruo. El gutoj fariĝas maro; sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo, dirante «la maro fariĝos aŭ ne fariĝos ankaŭ sen mia guto», — tiam nenion estos eble fari. Jam tiom multe da fojoj mi vane alvokadis la helpon de niaj amikoj! mi esperas, ke almenaŭ nun mia voko ne restos senfrukta.

Kiam la fina formo de la lingvo Esperanto estos teorie decidita, tiam mi intencas komenci la eldonadon de sistema «Biblioteko de la lingvo Esperanto». La «Biblioteko» konsistos el apartaj broŝuroj kaj libroj kaj enhavos: mallongajn lernolibrojn en diversaj lingvoj (pli vastaj lernolibroj estos eldonataj ekster la «Biblioteko»), riĉan krestomation da plej diversaj ekzercoj en la nova (fina) formo de nia lingvo, plenan vortaron kun traduko en 5 plej gravaj lingvoj, diversajn verkojn en la nova dialekto, originalajn kaj tradukitajn, prozajn kaj versajn, beletristikajn kaj sciencajn k. t. p. La «Biblioteko» eliradoa en la nombro de ĉirkaŭ 50 presitaj folioj en jaro, kaj ĉiu folio (16 paĝoj) kostos po 25 centimoj (= 10 kopekoj = 20 pfenigoj). La sistemo de elirado de la folioj estos pli-malpli tia, ke en ĉiu monato eliros 2 folioj da lernolibroj aŭ vortaroj en diversaj lingvoj kaj 2 folioj da literaturo.

Por ke la «tempo de elprovado» de la nova dialekto (tempo inter la teoria akcepto kaj praktika enkonduko) ne daŭru tro longe kaj por ke la elprovado ne estu tro neplena kaj nesufiĉa, ni ekster la «Esperantisto» faros vastajn provojn ankaŭ en la «Biblioteko», kaj por tiu ĉi celo la «Biblioteko» komencos eliradi tuj post la teoria akcepto de la fina dialekto kaj la unuaj 15 folioj prezentos provan krestomation, kiu enhavos en si riĉan kolekton da plej diversakarakteraj pecoj kaj artikoloj en la nova dialekto. Kiam la matura kaj ĉiuflanka elprovado finiĝos kaj la eble trovotaj maloportunaĵoj en la dialekto estos forigitaj, tiam (de la 16a folio) la «Biblioteko» komencos jam enhavadi nur verkojn konstantajn en dialekto jam neniam ŝanĝebla.

Por ke mi povu fari frutempe ĉiujn preparojn al la multeklopoda kaj multekosta eldonado de la «Biblioteko», mi insiste petas ĉiun amikon de nia afero, ke li volu sciigi min kiel eble pli frue, ĉu li abonos la «Bibliotekon» kaj en kia nombro da ekzempleroj. Por ebligi la entreprenon, ĉiu amiko estas petata kolekti ankaŭ abonojn por la «Biblioteko» inter siaj amikoj kaj konatoj. Aboni, t. e. finance subteni la entreprenon, povas ja ankaŭ tiaj personoj, kiuj lerni aŭ labori ne volas. Por ke la «Bibliotekon» povu aboni ankaŭ personoj, kiuj ĝis nun ne konas Esperanton nek la historion de la reformoj en ĝi, la unuaj 3 folioj de la «Biblioteko» enhavos la gramatikon kaj mallongan

vortaron de la reformita Esperanto en 6 plej gravaj lingvoj. La nomoj de la abonantoj estos presataj en apartaj aldonoj al la «Biblioteko».

Antaŭpagon mi ne postulas; ĉiu, kiu volas aboni, estas petata nur alsendi al mi (L. Zamenhof, Grodno, Rusujo) la sekvantan letereton: «Mi deziras ricevadi po . . . ekzempleroj de la «Biblioteko de la lingvo Esperanto»; pagon por la ricevotaj folioj (po 25 centimoj por presita folio) mi promesas sendadi al vi post la ricevo de ĉiu deka folio. Subskribo: . . . Adreso: . . .»

